N I A V O Ĉ O

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JUNIO 2003**

**GRANDA VORTARO**

Post la 15ª de junio la prezo de la vortaro ne estos 45 euroj sed 55 plus sendokosto. Laŭ informoj de Miguel G. Adúriz, "Gran Diccionario Español-Esperanto" estas jam en la presejo. Nun venas la plej ĝena parto de la loĝistika laboro: sendado. NUR EN SEPTEMBRO LA LIBROJ ALVENOS EN MADRIDO.
FUNDACIÓN ESPERANTO ricevis monon de pluraj esperantistoj por aĉeti dudekon da ekzempleroj de la vortaro de F. de Diego kiujn la Fundación donacos al publikaj bibliotekoj. Fundación instigas al la hispanaj esperantistoj imiti tiujn bonfarulojn kaj ili aspiras (se oni ricevas sufiĉan helpon) sendi almenaŭ unu ekzempleron al la publika biblioteko de ĉiu hispana provinco.

**ESPERANTO EN LA RETO**

Barcelona Instituto por Esperanto-Esplorado havas jenan ttt-paĝaron en esperanto kaj kataluna:
www.angelfire.com/falcon/ramonrius/bei.htm

**EŬROPA KONGRESO 2004**

La EEU-Kongreso en la jaro 2004 okazos en Bilbao, provizore de la merkredo 25-a ĝis la lundo 30-a de aŭgusto. La kotizo estos pli malmultekosta ol tiuj de la pasinta kongreso en Verona kaj havos specialan rabaton por tiuj kiuj aliĝos dum la hispana kongreso en Valencio aŭ dum la UK en Svedio. Pli da informoj vi trovos en www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

**ESPERANTO EN MUNICIPAJ BALOTOJ.** La partio "Candidatura d'Unitat Popular" de Mataró, maldekstra sendependa, inkludis la promocion de Esperanto en sia programo por la municipaj balotadoj: 'Garantii la ĉeeston de la lingvo internacia Esperanto en la instruado, la publikaj bibliotekoj kaj ĝia uzado en la internaciaj rilatoj kiel ponto-lingvo'

**OMAĜO AL F. DE DIEGO**

"Klaro kaj elasto". Fest-libro por la 80ª naskiĝtago de Fernando de Diego. Edition Iltis. 2003. Kunlaboras Miguel Fernández "Omaĝo en oda kleo al Fernando de Diego" kaj Antonio Marco Botella "Vivo kaj verkaro de Julio Mangada Rosenörn"

**FILMO EN ESPERANTO**

"El Coche de pedales" Tiel nomiĝas la filmo kiun oni filmas en Valencio, en kiu kelkaj scenoj (aŭ parto de ili) estas parolataj en Esperanto. Esperanto ludas gravan rolon en la filmo. Augusto Casquero sendis foton en kiu aperas kun li la reĝisoro, Ramón Barea, kaj la fama kin- kaj televid-aktoro Alex Angulo (tre bone karakterizita, ĉar la temo okazas dum la 50-aj jaroj). Marcos Cruz kaj Augusto helpis tradukante la frazojn al Esperanto, kaj helpante la geaktorojn bone prononci kaj parkerumi la tekstojn. Januare la reĝisoro kaj kunskriptisto de la filmo, Ramón Barea, petis de la Federacio kunlaboron prian. De tiam pluraj HEF-volontuloj kunlaboradis pri la projekto: Ili tradukis kaj adaptis skripterojn eble filmotajn Esperant-lingve, registris kun Ramón Barea sonbendon gvidan por la aktoroj, kaj fine marte la aktoro Álex Angulo, kiu rolas protagoniste, venis en la asociejon por interparoli kaj pliperfektigi sian prononcadon. Ankaŭ dum filmado la skipon konsilhelpis volontulo.

**LE MONDE DIPLOMATIQUE.**

La prestiĝa franca gazeto "Le Monde Diplomatique" enkondukis rektan ligilon al la oficiala paĝo de sia esperanta versio: http://www.monde-diplomatique.fr/int/

| NIA VOĈO 2003 | JUNIO |
| --- | --- |

**LIBRO DE A. NOBEL**

Okaze de la jarkongreso de la svedaj esperantistoj Eldona Societo Esperanto prezentis sian plej novan libron 'Nemesis - Nemeza'. Temas pri tragedio verkita de Alfred Nobel (jes, tiu de la famaj Nobel-premioj). La aŭtoro verkis ĝin en sia lasta vivojaro kaj presigis ĝin en 1896, sed la tuta eldono estis tuj detruita. Temas pri dulingva eldono, sveda-esperanta, vera monda sensacio, ĉar ĝi estas kaj unua eldono por svedoj kaj unua traduko en iun ajn lingvon. La libro estas 253-paĝa kaj bele bindita. Eblos aĉeti ĝin en ordinaraj librovendejoj en Svedio kaj ĉe la esperanto-libroservoj.

**BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTAJ TERMINAROJ EN INTERRETO**

En Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB, cxe www.eventoj.hu/steb aperis la ĝus finita listo "Terminaroj 1980-2002". Ĝi estas bibliografio de terminaroj eldonitaj inter 1980 kaj 2002 inkluzive. Ĝi rezultas de enketo proponita de Renato Corsetti antaŭ proksimume unu jaro en la retlisto "terminologio-l" (nun "terminologio"). Ĝi entenas referencojn de precipe paperaj verkoj, ankaŭ de kelkaj retaj. La bibliografion verkis Jerome Vachey.

**PORCELANOJ LLADRÓ INVITAS KONGRESANOJN**

Ĉiuj partoprenontoj en la valencia Kongreso de HEF estas invitataj viziti dumkongrese la porcelan-fabrikon "Lladró", nomata "La Urbo de la Porcelano", kie oni povos rigardi la tutan proceson de la produktado de tiuj porcelan-artaĵoj, simbolo de la valencia industrio en la tuta mondo. Tutan proceson, komplete mane, eblos rigardi, kun fino en la Muzeo de la Lladró-porcelano, kaj en la pentrajxkolekto de la familio Lladró, kun pentraĵoj de plej universalaj pentristoj, kiel Greko, Sorolla, Zurbarán, kaj multaj aliaj.

**VIZITO AL LA URBO DE LA ARTOJ KAJ LA SCIENCOJ EN VALENCIO**

La kongresanoj vizitos dum la valencia Kongreso la kolosan Urbon de la Artoj kaj la Sciencoj, en kiu elstaras la Palaco de la Artoj, la Muzeo de Sciencoj kaj la oceanografia Zoo, en kiu la vizitantoj povas promeni tra kristalaj tuneloj ĉirkauitaj de ĵarkoj kaj ĉiaspecaj fiŝoj. Ĉio laû impona futurisma arkitekturo.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj: 16-a de junio. 19,00h. “Rol-ludoj”. Juan del Castillo

**VENONTAJ KONGRESOJ**

KONGRESO DE HISPANA ESPERANTO FEDERACIO en Valencia 15-20-a de julio
http://www.esperanto-es.net/kongreso/2003/
Kunveno de Asocio Maldekstro kaj Esperanto - SAT en Hispanio. Valencia 18 Julio.
76-a SAT Kongreso. 12-19 julio. Le Chaux-de-Fonds (Svisio)
88-a UK. 26 julio - 2 aŭgusto. Göteborg (Svedio).

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**